# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
J.Miguel García Iturrioz
(jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna: 20 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JANUARO/MARTO 2019** **Nro. 118 (1/19)**



# 106 JAROJN!!!!

## KORAN GRATULON, EDUARDO

## LOKE ...

## NOVA ESPERANTO-KURSO.

La vendredon 8-an de februaro komencis nova kurso en nia sidejo gvidata de nia amiko David Redondo.



Ĝi disvolviĝos ĉiuvendrede, de la 19:30 ĝis la 21:00 h.

Sur la foto pozas la instruisto apud la gelernantoj kaj diversaj membroj de nia E-Grupo.




Afiŝo de la kurso, dezajnita de la instruisto mem, nia laborema amiko David Redondo.

## EDUARDO LARROUY, 106-JARA.



La pasintan 9-an de marto, nia amiko **Eduardo Larrouy iĝis 106-jara**. Naskiĝinta en 1913 en Haro (La Rioĥa) li devenas el franc-vaska familio. Esperantisto ekde 1932, kiam estis 19-jara junulo, li travivis kiel soldato la malfacilajn tagojn de la hispana interna milito (1936-39) kaj la terurajn jarojn post la milito, sed ankaŭ la reveno de demokratio al Hispanio kaj la renaskiĝo de Esperanto en Bilbao. Koran gratulon al tiu entuziasma esperantisto, bonkora kaj ege kortuŝa homo.

**LOKE ...**

## LOTERIO 2018 NEPREMIITA.



ESPERANTO
www.esperanto.net
Esperanto-Grupo
Barrencalle Barrena, 7 - 1.º • Tfno. 658 70 90 87
48005 BILBAO

**Nacia Loterio N°96.201**

La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per kvar (4,00) eŭroj, la numeron kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2018.

0001

**4,00 eŭroj**
(MON-DONACO: + 1,00 €

*En caso de premio, este número estará sometido a los gravámenes que establece la legislación tributaria vigente.*
*Senvalora post 3 monatoj. Caduca a los 3 meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea*

Imprenta MENA - Portugalete

Neniu surpriziĝis pro esperebla fakto:

La kristnaska loterio de la E-Grupo de Bilbao ne atingis premion, do ni devos atendi, unu plian fojon, ĝis decembro por rehavi la esperon fariĝi milionuloj.

Malgraŭ tiu malsukceso, ni dankas la monhelpon, kiun ni ricevis el ĉiuj, kiuj aĉetis niajnkvitancojn, tre speciale ni dankas al tiuj, kiuj, loĝante ekster Bilbao, aĉetis ilin per interreto.

## ZAMENHOFA FESTO-TAGO.




Kiel anoncite, la pasintan 15-an de decembro, nia Grupo, same kiel multaj aliaj tra la tuta mondo, omaĝis la kreinton de Esperanto, Ludwig Zamenhof.

Sur la maldekstra foto, nia prezidanto, Pako López, prelegas pri podkastoj kaj ilia apliko al instruado de Esperanto.




Kaj sur la dekstra foto, José Ignacio Orejas prelegas pri la rilatoj inter Esperanto kaj la laborista movado, ĉefe la anarkiisma, en Bizkajo.

**LOKE ...**

## LA NOVA KURSO DAŬRIGAS SIAN VOJON.




La nova kurso, gvidata de David Redondo, daŭrigas sian vojon plensukcese.
Ĝin ĉeestas ne nur novaj gelernantoj sed ankaŭ gelernantoj de pasintaj kursoj kaj veteranaj membroj de la Grupo.
Sur la foto, post fino de leciono, kelkaj kursanoj alproksimiĝis al la piano kaj ludis ĝin por sin dikstri.
Poste, kelkaj el ili daŭrigis la kunvenon tra drinkejoj de la malnova kvartalo.

## SOCIARO.

Dum la jaro 2018,

<u>Aliĝis</u>: Octavio Gutiérrez Moja
José Miguel Ibarreche Olea
Iñigo Belasko Dañobeitia
Diego Guerín Aguilar
Olatz Zubiaurre Aranberri
Ángel de la Hoz Cuesta

<u>Eksis</u>: Rubén Gutiérrez Rapp
José Pérez-Salado Kamps

Je la 31-a de decembro 2018, la Grupo havis 56 membrojn..

## E-aranĝoj.

| | |
|---|---|
| 01-05 maj. | 78-a Hispana Kongreso. Málaga. |
| 03-05 maj. | 21-a Andaluzia Kongreso. Málaga. |
| 03-10 maj. | 71-a Kongreso de IFEF. Málaga. |
| 13-20 jul. | 52-a ILEI-kongreso. Ĉaĉak-Serbio. |
| 14-20 jul. | Ekskurso tra la tri baltaj landoj kaj veno grupe al UK. |
| 20-27 jul. | 104-UK (Universala Kongreso). Lahtio – Finlando. |
| 28 jul.-04 aŭg. | 75-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Liptovský Hrádok, Slovakio |
| 04-11 aŭg. | 92-a SAT-Kongreso. Barcelono. |
| 21-27 dec. | 7-a Afrika Kongreso de Esperanto. Buĵumburo, Burundo. |
| 27 dec. – 03 jan. | Junulara E-Semajno. Głuchołazy, Pollando. |
| 11-18 jul. 2020. | 76-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Someren (Nederlando). |
| 01-08 aŭg. 2020. | 105-UK (Universala Kongreso). Montrealo (Kanado). |

**H.E.F.**

## BLOGO PRI MADRIDA AGADO.

Juna studento de magistra kurso pri Multmedia Ĵurnalismo en la Madrida Universitato Complutense, Patricia Merello, kreis multmedian projekton pri Esperanto, kiel baza parto de sia akademia aktivado, kun la titolo “El sueno de Zamenhof” (La revo de Zamenhof).

Temas ĉefe pri blogo https://lalenguadezamenhof.wordpress.com/, kiu celas montri la ĉefajn kulturajn esperantistajn agadojn kreitajn en Madrido, plus diversajn aspektojn de la historio de la lingvo en Hispanio. Ĝi estas redaktata en la hispana lingvo, kun multmedia karaktero, uzante videon, tekstojn, aŭ materialon, bildojn aŭ hiperligilojn. Krome, la projekto estas disvastigita pere de la sociaj retoj, Twitter kaj Facebook.

*(“Nia Voĉo”, órgano de Madrida E-Liceo. Januaro 2019)*

## LA LINGVAN SITUACION EN EŬROPO POST LA BRITELIRO.

La lingva situacio en Eŭropo estos la gvida temo de la 78a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝos en Malago inter la 1a kaj 5a de majo. La renkonto okazos preskaŭ koincide kun la kampanja periodo por la Eŭropa Parlamento kaj kelkajn semajnojn post la (supozebla) eliro de Britio el la Eŭropa Unio.

Ĉu sencas ke la angla lingvo konservu la privilegian rolon kiun ĝi fakte tenas en la institucioj de la EU? Ĉu konserviĝos la nuna lingva reĝimo, karakterizita per teoria egaleco inter la oficialaj lingvoj, sed kun klara praktika dominado fare de iuj majoritataj lingvoj, establita per la forto de la faktoj? Kiun favoras tiu fakta reĝimo? Ĉu la nuna malkontento pri Eŭropo en multaj landoj kaj tavoloj rilatas al tiu sistemo de dominado, pri kiu la lingvoj estas plua manifestiĝo? Ĉu neŭtrala internacia lingvo povushavi rolon en la nova lingva reĝimo kiun oni nepre devos fiksi post la Briteliro?

Pri ĉio ĉi oni devus paroli en la venontaj monatoj, kaj Hispana Esperanto-Federacio deziras esti parto de tiu ĉi debato, prezentante la rolon kiun Esperanto povus ludi kielneŭtra komunikilo kaj kiel helpa ilo en la interŝtata komunikado.

Dum tiu ĉi jaro 2019 ni planas organizi diversajn aktivadojn por konsciigi la ĝeneralan publikon kaj specife la politikistojn, ke alia lingva sistemo eblas en Eŭropa Unio, kaj ke nun estas la momento ĝin diskuti, kaj nedevigi per la forto de la faktoj.

La Hispana Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos kune kun la Andaluzia Kongreso, estos la momento pruvi ke alia komunikado eblas kaj dezirindas. Ni planas ne nur diskuti pri la rolo de la lingvoj en Eŭropo, sed ni pruvos ke tiu estas praktike ebla: ni antaŭvidas la ĉeeston de pli ol cento da vizitantoj el aliaj landoj, partoprenontoj en la Internacia Kongreso de la Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, kiu parte koincidos kun la nacia renkontiĝo. Dum tiu ĉi semajno ni havos la okazon rilatiĝi al personoj de ĉiuj kulturoj, utiligante lingvon internacian, neŭtralan, simplan, kiu neniun diskriminacias.

*(El BIT-Bulteno de HEF)*

TTT-ejo de Hispana E-Federacio (HEF):
http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco

**H.E.F.**

## DU PREMIOJ POR AMIKOJ DE ESPERANTO.

Dum tiuj ĉi pasintaj tagoj du neesperantistoj kiuj plurfoje montris sian apogon al la internacia lingvo aperis en la novaĵservoj.
La kantisto **María Villalón** estis la venkinto de la tre spektata televida muzikkonkurso nomata "Tu cara me suena" de la televidstacio Antena 3. Ni memorigas ke María brile koncertis en la 73a Hispana Kongreso de Esperanto en Arundo (Ronda) en 2014, kie ŝi kantis du pecojn en Esperanto: La pluvo kaj Viviga pluvet'.

Aliflanke, la filmo "Roma" de **Alfonso Cuarón**, ricevis la Oskarpremiojn al la plej bona filmo neanglalingva kaj al la plej bona reĝisoro. La filmo estis produktita de la kompanio "Esperanto Filmoj", tiel alnomita de Alfonso Cuarón, kiu plurfoje montris sian simpation al Esperanto. Gratulon al ambaŭ!

*(El BIT-Bulteno de HEF. Nro. 54)*

## KER-EKZAMENOJ EN MALAGO.

Dum la Hispana Esperanto-Kongreso kiu okazos komence de majo en Malago eblos oficiale ekzameniĝi laŭ la niveloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Vidu la kunvokon en tiu ĉi retejo https://edukado.net/ekzamenoj/ker/andaluzio. La ekzameno okazos la sabaton 4an de majo, kaj ĝin gvidos Katalin Kováts.

Por pliaj enhavaj informoj skribu al ker-ekzamenoj(ĉe)edukado.net. Pri organizaj kaj logistikaj demandoj turnu vin al la LKK de la kongresoj.

Ni memorigas ke krom la 78a Hispana Kongreso de Esperanto (1 ĝis 5 de majo), dum tiu semajno okazos en Malago la 71a Kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj kaj la 21a Andaluzia Esperanto-Kongreso.

En la retejo http://esperanto-andalucia.info/ eblas trovi ĉiujn detalojn de la aliĝo, inklude de la abunda programo, kiu havas tre interesajn novaĵojn. Krome, aliĝis pluraj homoj, tiel ke ni jam kalkulas je la ĉeesto de preskaŭ 130 homoj. Vidu ĉiujn detalojn, inklude de la aliĝiloj, en la oficiala retejo.

*(El BIT-Bulteno de HEF. Nro. 54)*

## ESPERANTO EN NAVARO.

Eble vi jam konas, sed jen longa artikolo pri Esperanto en Navaro:
http://www.culturanavarra.es/uploads/files/06_gurbindo_PV269.pdf

*(T. del Barrio. 18/03/2019)*

## Zamenhof legas kelkajn frazojn de la unua libro.

Kun iomete da muziko: https://youtu.be/GUd6mYXVtnU

*(Pablo Busto. 14/03/2019)*

## INTENSIVA KURSO DE ESPERANTO EN CULLERA.

Gvidata de Dennis Keefe. *Esperanto-Plaĝo*, intensiva kurso de Esperanto apud la mediteranea maro. en aprilo kaj majo, dum 61 tagoj. 8 horojn ĉiutage krom dimanĉo.

# TRA LA MONDO …

## INTERESA FOTO.




Ĉi tiu foto tamen ne estas ŝerco. Ĝi estis fotita dum la partolado de sinjorino Angela Merkel en Hotelo Esperanto en germana urbo Fulda. Do, sufiĉe bona reklamo por Esperanto, ĉar ĝi aperis multloke.

*(Eŭropa Bulteno. Nro. 186. Nov. 2018)*

## La filmo "Roma" kaj "Esperanto".

La filmo "Roma" ricevis almenaŭ tri Oskar-premiojn. Mi jam spektis ĝin kaj estas belega. Mi tute rekomendas ĝin. Kiel propagandilo ni povas fanfaroni inter konatuloj ke la produktora entrepreno estas "Esperanto filmoj", kaj tio aperas en la unua kaj lasta fotaĵo de la filmo. Mi ne scias kiel ĝi povas esti spektata kaj ĝuata de nehispanlingvanoj, ĉar tradukoj perfidas.

*(Kani. 25/02/2019)*

## Facillingva retejo de UEA

La 19an de januaro ĉi-jare aperis nova retejo de UEA. Ĝia nomo estas *uea.facila*, kaj ĝi estas videbla ĉe: http://uea.facila.org. Ĝia celo estas prezenti la Esperanto-movadon al novaj esperantistoj per facila lingvaĵo. Tial ĝi estas taŭga por lernantoj, sed esperebl ĝiaj mallongaj novaĵartikoloj povus esti interesaj ankaŭ por pli spertaj esperantistoj. Ĝi estas senpage abonebla, do ne necesas esti membro de UEA por legi ĝin kaj komenti.

La artikoloj konsistas ĉefe el novaĵoj kaj informoj pri la Esperato-movado, sed estas ankaŭ ĝeneralaj legaĵoj, informoj pri filmetoj kaj aliaj materialoj troveblaj tra la reto, kalendaro de estontaj kunvenoj kaj aliaj.

Estas grave, ke la legantoj ne nur pasive legu, sed sentu sin parto de la afero, do ili havas eblecon komenti sub la artikoloj, prezenti sin en la paĝo "Niaj legantoj", kaj sendi mallongajn raportojn kaj fotojn pri lokaj agadoj.

La facila lingvaĵo de la artikoloj estas bazita sur la iama vortlisto de *Kontakto*, nun reviziita. Aldonitaj vortoj rilatas plejparte al komputado kaj Interreto, dum estis forigitaj kelkaj vortoj, kiuj ne ofte estas bezonataj en tia retejo. La reviziita vortlisto troviĝas ĉe: https://uea.facila.org/vortlisto/

La ĉefredaktoro estas Anna Löwenstein, kaj jam formiĝis tuta reto de kunlaborantoj. Emilio Cid, estrarano de UEA, subtenis la projekton ekde la komenco, kaj estas grave mencii la kontribuon ankaŭ de ESF, kies subvencio necesis por ricevi la helpon de profesia programisto.

*(Informo de UEA. 21/01/2019)*

# TRA LA MONDO …

## YouTube en Esperanto: Tubaro.




Tubaro 'tubaro.aperu.net': la YouTube en Esperanto.

Jen ĝia prezento:
https://tubaro.aperu.net/v/ytb_moAn4pZysfo/

(*Prenita el la TTT-ejo de la E-Grupo de Bilbao: https://sites.google.com/site/esperantobi/home. 15/02/2019*)

## UEA KAJ UN EN 2019-2020 – MULTFLANKA KUNLABORO.

La oficejo de UEA en Novjorko troviĝas vidalvide de la ĉefa sidejo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), ĉe la adreso 777 United Nations Plaza. De multaj jaroj, do, tiu cifero havas apartan signifon, kiel simbolo de la longadaŭra kunlaboro inter la ĉefa monda asocio de esperantistoj kaj la ĉefa monda organizo de la ŝtatoj.

Tial, en ĉi tiu 777-a Gazetara Komuniko, ni enfokusigas la nunajn formojn de tiu kunlaboro, kiu daŭre iĝas pli proksima, pli intensa, kaj pli vasta laŭ sia temaro. La kampon vigle kaj atente gvidas estrarano Sara Spanò, kun laŭbezona subteno de la prezidanto Mark Fettes, aliaj estrananoj kaj la Ĝenerala Direktoro.

Jam de pli ol 60 jaroj, UEA kultivas kunlaborajn rilatojn kun pluraj branĉoj de UN. En Novjorko, temas pri la Departamento pri Publika Informado (DPI: ekde 1 jan. 2019 nove nomata la Departamento de Tutmonda Komunikado) kaj la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK); en Parizo pri la Organizo de UN pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko), kaj en Ĝenevo kaj Vieno pri diversaj organoj de UN rilate al paco, homaj rajtoj, kaj indiĝenaj popoloj. Ĉiujare ni renomumas niajn oficialajn reprezentantojn en tiuj urboj. En la nuna jaro temas pri:

- **UN-Novjorko**: Ĉefreprezentanto: Humphrey TONKIN. Reprezentantoj: Jonathan LIECHTY, Michael BRANDINI, Ulrich BECKER. Raúl J. GARCIA.
- **UN-Ĝenevo**: Ĉefreprezentanto: Stefano KELLER. Reprezentantoj: Alain FAVRE, Nicole MARGOT, Francesco REALE.
- **UN-Vieno**: Ĉefreprezentanto: Hans-Michael MAITZEN. Reprezentantoj: Norina FLORINETH, Alfred HEILIGENBRUNNER.
- **Unesko-Parizo**: Ĉefreprezentanto: Renée Triolle. Reprezentantoj: Barbara DESPINEY, François LO JACOMO.

## KONSULTIĜO DE LA EŬROPA OMBUDSMANO PRI LINGVOJ.

Aperis resumo de la konkludoj de la raporto pri la konsultiĝo proponita de la Eŭropa Popoldefendanto (Ombudsmano) pri la uzo de lingvoj en la institucioj de Eŭropa Unio.

Legu ĝin en la retejo de la ombudsmano (la ligilo estas de la hispanlingva versio). Ni memorigas ke la lingva politiko en Eŭropa Unio estas unu el la ĉefaj kaksoj de la Hispana kongreso de Esperanto en Malago, kiun ĉeestos Seán O'Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio.

*(“La Bitbulteno de HEF. N-ro. 54. Feb. 2019)*